

NIA

GAZETO

MONATA ELDONO DE
« L'ECLAIREUR DE NICE ET DU SUD-EST »

3-a Jaro — N-ro 2 (26)
FEBRUARO 1936

REDAKCIO
ADMINISTRACIO :
NICE (Francujo)
29, av. de la Victoire

★

DIREKTORO :
GEORGES AVRIL

ĈEFREDAKTORO :
S. GRENKAMP

PREZO : fr fk 1.50

JARABONO. — Francujo, fr fk 10 (svifk 2) ; landoj aliĝintaj al la konvencio de Stockholm, fr fk 12 (svifk 2,40) ; aliaj landoj, fr fk 15 (svifk 3).

ANONCOJ : unucentimetra kolonero (67 m/m larĝa) kostas frfk 5 (svfk 1). Anoncoj pri korespondado, interŝanĝo, ktp., kostas frfk 2,50 (svfk 0,50) por tri linioj. Postŝeeka konto Marseille n° 263-74, Eclairneur.

Psikologio de la homamaso

La esploroj de grandaj kaj eminentaj psikologoj kiel Le Bon, Spencer, Wundt, Abramowski k. a. pruvus, ke la homamaso havas sian specifan kaj tre interesan psikologion.

Oni pruvus, ke homo en la amaso aliŝanĝigas ofte ĝis nerekonobleco ; ofte sovaĝiĝas, fariĝas kuraĝa. Sed ĝuste pro tio, li fariĝas facila ofero de sugesto, vizioj, admirado kaj de diversaj similspecaj sentoj, kiuj elvokas ofte la en ĝi kaŝitajn instinktojn, apenaŭ vualitajn de la kulturo.

La agiloj, kiuj en tio tiom forte aktivasi, estas la imitado, timo, entuziasmo, ekflamiĝo kiel ankaŭ pli aŭ malpli granda nombro da sugestoj, vizioj, admirado kaj de diversaj similspecaj sentoj, kiuj elvokas ofte la en ĝi kaŝitajn instinktojn, apenaŭ vualitajn de la kulturo.

La homamaso kaj ĝenerale ĉia pli granda aro da homoj, alprenas per si mem tuj certajn karakterizajn trajtojn.

Observante oni konstatas ĉe ĝi :
a) Ĝenerala malpliinteligentigo de la ĉeestantoj (ĉar alie oni ne povus kompreni, ke ekzemple dum Co-kursoj malnovaj esperantistoj povas ridi ĉe plej stultaj frazoj jam centfoje aŭditaj kaj havante kutime preskaŭ nenian specifan sencon...);

b) Facilanimecon kaj blindan obeemon (la militoj ĉiam huras akceptataj estas sufiĉa pruvo, por ne bezoni citi esperantajn sencencojn el dumkongresaj diskutoj) ;

c) Reciprokan similitudon (kion faras la esperantistoj, konstante kaj senfine !);

d) Incitemon, trosentemon kaj juĝmalkapablon ;

Eraras tiuj, kiuj pretendas, ke amaso da homoj estas ilia sumo ; ĝi estas io tute alia, matematike neprezentebla, io nova.

Ni komprenas do nun, kial ĝenerale proverboj de ĉiuj nacioj pri homamaso ne estas al ĝi flataj.

Montesquieu, la fama franca publikisto de la dekokaj jarcentoj, diris : *Ju pli da saĝaj homoj kunvenas, des pli malsaĝaj estas la decidoj.*

Kaj mi aldonu : *Al homamaso ne sedu, sed tuj ĉiam cedu.*

Homoj, ĉe plejbonkoraj kaj mildaj, povas en la homamaso tute transformiĝi kaj pro tio jam en la antikva Romo oni diris : *Senatores boni viri — senatus autem inda bestia aŭ esperante : Senatanoj estas bonaj homoj, sed la senato estas malbona besto...*

Cu vi rememoras el historio, el multaj faktoj, dum kiuj la amaso montriĝis ĉiam besteca ? La komu-

naj murdoj en la amaso estas kutime la plej teruraj kaj certe unuopulo ne kapablas esti tia majstro en la besteco.

Kaj ankaŭ gvidanto de famaso scias, ke en ĝi povas kreiĝi kaj elkoviĝi faktoj novaj, neantaŭvideblaj kaj tiam — la gvidanto facile povas perdi la kontrolon, la regadon super la amaso...

Ne ĉiam nur forta individualeco scipovas regi la amason. Ofte, kio estas cetero konata en la historio de popoloj, simplaj frenezuloj, duobanditoj, fanatikuloj kaj aliaj similituloj, plie duoninteligentaj tipoj, simplaj vilagknabinoj kaj ĉe infanoj povas regi super la amaso.

La homamaso povas facile fali de la potenco...

Ĉiu registaro, kia ajn estas ĝia formo deziras, avidas, ni ĉe povas diri soifas, por povi sugestoteni la amason en la granda valoro de la registara povo, kaj por sia plej granda populareco.

Per tio ĝi tenas kaj katenas la popolon, ĝi sukcesas havi ordon kaj — konkordon, forfroti ĉian troan individualecon kaj kiel plej eble similigi unu civitanon al alia, kiel fabrikajn objektojn.

Sed kelkfoje sufiĉas nur kelkaj vortoj de agitanto, por ke sub ilia influo la samaj homoj, kiuj antaŭmomente estimis kaj adoris ian povon, ĝin — disŝiru kaj distretu ion poste.

Nur cetero tiel oni povas kompreni la amason, kiu krias : *mortu UEA !* kaj ion poste tuj : *vivu UEA !*

Fama esploristo Behterev asertas, ke ĉe la homamaso okazas malpliigo de la konscio, laspeca mallarĝigo de la konscia kampoj, pro kio ĉiu unuopa persono fariĝas pasiva instrumento de fremdaj pensoj, sento kaj volo perdante sian kritikan juĝon kaj normalan personecon.

La homamaso similas cetero tute al brutaro. Ni renkontas tie la saman analogian psikon. Komuna tipa simptomo estas la timpaniko.

Elprofitis ĝin jam Hanibalo en la batalo kontraŭ la romanoj.

Profitas el ĝi ankaŭ kelkaj gvidantoj, kiuj traktas ofte la amason kiel simplan — brutaron.

S. GRENKAMP.

(Represo al finaj ŝtelistoj malpermasata).

BONVOLE LEGU :

Paĝo 2 : « Portretoj de Hitler kaj Zamenhof pendas kune sur la muro » ;

Paĝo 3 : « Lingva Konsilanto » ;

Paĝo 4 : « Vivu la reĝo ! »

FLUGFOLIOJ

Antaŭ multaj jaroj, la fama franca verkisto Tristan Bernard organizis en Pariza teatro tre interesan konkurson : sur la scenejon venis ses francaj diplomitaj profesoroj de angla, germana, itala, hispana, rusa kaj esperanta lingvoj, al kiuj oni disdonis francan tekston enhavantan kelke da malfacilaĵoj. Tiun tekston ĉiu el la profesoroj tradukis en la lingvon, kies instruisto li estas. Plenuminte sian taskon, ili lasis sian tradukon sur la tablo kaj foriris ; ilin anstataŭis ses aliaj samspecaj profesoroj, kiuj retradukis francan la tradukon de la unuaj. La franca teksto revenis pli malpli kripligita ; ekzemple, el la rusa teksto, ĝi estis ŝanĝita ĝis preskaŭ plena nerekonobleco ; male, elirante el sia esperanta trairejo, la franca teksto reaperis absolute tia, kia oni ĝin unue diktis, kaj esperanto nedispoteble meritis la unuan premion. Komprenoble, aplaŭdoj, huraoj, ktp., plenumis la ĉambregon, kies ĉeestantaro precipe konsistis el esperantistoj. Mi min turnis al mia najbaro kun ĝojo kaj admiro ; sed li mallaŭte subdiris al mi en la oreolon : « Tio simple pruvus, ke la esperantista profesoro faris sian tradukon en tre malbona, esperanto ; li metis esperantan maskon sur ĉiun el la francaj vortoj tiamaniere, ke la teksto, sub esperanta ŝajno, reale restis franca... »

Eble, li estis prava...

La ĉefa celo de esperanto ne estas traduki, kiel eble plej fidele, naciajn tekstojn ; ĝi estas ebligi, ke ni esprimu nian penson per la novaj rimedoj, kiujn Zamenhof donacis al ni. Niaj ekzamenoj ĉiam konsistas el tradukoj, kaj ju pli la teksto estas malfacila, des pli oni juĝas la kandidataton lerta ; kaj kiam poste oni lin petas rakonti ion en esperanto, oni ekvidas, ke li, ĉu pro malbona akcento, ĉu pro mallaŭga vortordo, tute malbone parolas nian lingvon. Fidela kaj laŭteksta traduko necesigas tiom da esperantaj vortoj, kiom estas da naciaj en la tradukota teksto, kaj de tio venas nia ĉiam kreskanta bezono de neologismoj...

Mi memoras, ke, iam, en unu el niaj antaŭaj kongresoj, mi aŭdis

konversacion tre interesan je tiu vidpunkto ; dum promenado en belega parko, dekjara knabo petolis sur la herbo kaj provis sin stariĝi sur la manoj. Unu samideano diris : « La knabo estas ĉie la samaj ». La alia respondis : « Jes ! la knabeco estas internaciaĵo ».

La unua, nedubeble, tradukis nacian frazon esperanten.

La dua parolis esperanton.

ERA.

TRAGEDIO EN LA PARKO

de G. GERO

Granda ludejo. Ĉe fino de la sablegita ebena infanoj formas grandan rondon por iu pratempa ludo. Brillanta ruĝa pilko flugrapidas en la rondo.

Estas tre bone gardataj infanoj. Ili ĉiuj aspektas kvazaŭ ili venus rekte el iu purigejo. Ili havas strange maljunsaĝajn rigardojn. Kaj se la knabinoj ordigas al si la harojn, kiuj disflugis en la ludo, ili faras la samajn gestojn kiel la patrino hejme antaŭ la spegulo. Ili estas tre bone edukataj kaj tute ne scias, ke ili neniam fakte povas ĝuste brui kaj esti ĝojaj, kiel la aliaj infanoj. Ili obeeme staras unu apud la alia kaj jetas bonmore sian pilkon en la rondon.

Malantaŭ la heĝo, kiu ĉirkaŭas la ludejon, eksonas akra kriado : « Fuuu ! Fuuu ! Fuu ! » Malgranda, malgrasa bubo venas el la angulo. La ŝtrumpetoj pendas falde ĉirkaŭ liaj tre grandaj sandaloj. La vestaĵo suras streĉe ĉe la ŝultroj. La malgrandulo fervore enprofundiĝas en sia faro. La fingroj estas pugnitaj, la kubutoj premitaj al la korpo. Li rapide surpaŝas la grincantan sableron. « Fuuuuu, fuu, fuuu ! » Du kurblinioj dekstren, tri kurblinioj maldekstren kaj la benko estas tunelo. Laŭte ĝemante nur trairas la ekspreso ĉi tie. Seninterrompe hurlas la sireno : « Fuuu ! Fuuu ! Fuu ! Fuuu ! »

La fratinoj ĉirkaŭe mutiĝas. Dek okulparoj traboras la junulon. Kia malpura infano !

La malgranda bubo rimarkas nenion. Li estas longa vagonaro kaj trarapidas la mondon. Ĝis al la blankaj ursoj li veturas kaj ĝis en la utopilando. Nur se venas granda akvo, poste la lokomotivo ricevas flugilojn kaj kun ĉiuj vagonoj transflugas ĝin. Jes ! Nun venas ankoraŭ granda monto kaj post ĉi tiu... subite disŝiriĝas la pensofadeneto, brillanta ruĝa pilko estas kulpa pri tio. Tian belaĵon li neniam ankoraŭ vidis. Kian senton oni devas havi, se oni tuŝas tian pilkon ? Fakte tuŝi kaj ne ĉiam nur rigardi malantaŭ la altaj montraĵ fenestroj, estas la pensoj de la ekscitita bubo. Lia buŝo estas duone malfermiĝinta. La brakoj estas premitaj al la korpo. Li tute forgesis mallevi ilin. Li nur staras kaj rigardas.

Nur heziteme li proksimiĝas. Malgrandajn, etajn paŝetojn... pli proksime. Hipnotita de la fluganta pilko. Nun kaptas ĝin knabino. Orblondajn buklojn ŝi

havas kaj blankajn manetojn. Si tiel ĉarme aspektas kaj... si certe ne malpermesos... se li ŝin petos pri tio. La bubo dufoje provas paroli, sed nur poste estiĝas vorto. Tiel forte batas lia koro. « Ci, mi petas... ĉu ci permesas... ke mi... iom... kunludu? »

Malrapide la etulino turnas la kapon. Du esporemaj okuloj tuŝetas la junulon. « Ci... mi petas... lasu min... unufoje... ĵeti... »

La knabino estas senkonsila. La aliaj ariĝas kaj formas senmovan muron de defendo. Poste subite parolas knabo en blua marista vestaĵo. Li antaŭenpremis sin kaj nun larĝe kaj forte jen staras, kun vaste starigitaj kruroj. « Iru for... ni ne havas permeson ludi kun tiaj infanoj... la fraŭlino ne toleras tion! »

« Kun kiaj infanoj? » demandas la junulo kaj sentas kiel liaj vangoj ekstrema kaj varmege brulas liaj okuloj.

« Kun tiaj infanoj kiel vi », diras mallalte la helblonda knabino kaj malrapide sin forturnas.

La infanoj formas novan rondon. Fraŭlino, kiu jam levigis de la seĝo, trankviligite denove sidigis. La malgranda junulo rigidigis. Poste li fulmrapide kliniĝas kaj ekprenas en senbrida malamo la polvan sableron. Per abrupta ŝvingo li etendas la manon, sed subite haltas en la duona movo. Mallaŭte la ŝtonetoj elglitas el liaj fingroj... Li akre ekkrias: « Mi ja tute ne volas ludi kun vi! Vi ĉiuj estas tro stultaj por mi! Kaj hejme mi havas pilkon, kiu estas dekfoje pli granda, ol la via! Kaj multe pli ruĝa! »

La infanoj ne respondas. Por ili la malgranda stratbubo ne plu ekzistas. Li rektigas, granda kaj rigida, kaj premas pene la manon al la brusto. La kubutoj ree kuŝas ebene sur la korpo kaj lia sovaĝe skuiginta vizaĝo estas alte levita. Kun tremantaj genuoj li trenas sin sur la sablon. Du kurblioj dekstre, tri kurblioj maldekstre kaj la benko estas tunelo. « Fuuu! Fuuu! Fuu! Fuuu! »

Malantaŭ la heĝo, kiu ĉirkaŭas la ludejon li mutiĝas. Poste, kiam li turnas sin kaj rimarkas, ke oni ne plu povas vidi lin, li ekploras. Kaj kiam li fine forlasas la parkon, kun pendantaj brakoj kaj mallevita kapo... jen mortis en li infaneco.

F. W. V.

Kia Mensogulo!

Tristan Bernard rakontis jenan humorajon, kiun li atribuas al Mark Twain.

Dum milito, ni diru dum la iama enlanda milito de l' sudaj usonaj ŝtatoj kontraŭ la nordaj, soldato komisiita, helpi al la vunditoj sur la batalkampo, renkontis terkuŝantan kamaradon, kiu penis bandaĝi per postuko la stupon ankoraŭ restantan de la maldekstra kruro.

— Helpon! helpon! li ĝemvokis, unu kruro pafaĵo ĵus detranĉis de mi!

La soldato metis la vunditon sur sian ŝultron, tenante al li la sanan membron, dum pendas malantaŭe la kapo kaj la brakoj, kaj iras returne al la vunditejo.

Survoje, meze de l'kanonado alia pafaĵo senkapigas la unukruron, senrimarke de la portanto, kiu kviete daŭrigas sian iradon.

— Ĉu vi frenezigis? Alparolas la ĉefkuracisto la viron enpaŝantan la vunditejon, vi nun kunportas kadavron ĉi tien, he!

— Li ne kadavrigis, sinjoro ĉefkuracisto, nur kruro mankas al li.

— Nu! vi do ne vidis, ke li estas senkapa?

Senkapa! ekkriis la mirigita soldato, terenmetinte sian portadon... Tamen li ja diris al mi, ke nur unu kruro li perdis!

RAPORTO pri la PORKROSTAĴO

de CHARLES LAMB (1775-1834)

La vivo de Charles Lamb — tiu agrabla antaŭulo de Dickens, — kiu disvolvigis de 1775 ĝis 1834, estus evoluinta laŭ tiu de pacema ŝtatoficisto se terura okazintaĵo ne estus ĝin perturbinta. Infermule frencza, lia fratino Mario ponarde mortigis la patrinon. Lamb sindone servadis al sia fratino, por dum multaj jaroj ŝin prizorgadi kaj kontroladi. Dum la klarvidaj intertempoj de la mal-sanulino, li prenis ŝin kiel kunlaborantinon. Kune ili skribis por la infanoj tre intersajn fabelojn eltiritajn de Sekspir.

La « Raporto » ĉi-sube esperantigita estas plaĉa evidentiĝo de la angla humoro.

Dum la sepdek mil unuaj jaroj de ĝia ekzistado, la homaro — rakontas hina manuskripto, kiun mia amiko M... komplezege legis kaj klarigis al mi — nutris sin nur per ne kuirita viando, mane aŭ dente ĝin dieŝirante el la viva besto, kiel ankoraŭ nuntempe faras la etiopo. La fama Konfucio aludas pri la tiama epoko en la dua ĉapitro de siaj « ŝanĝigoj de la mondo » nomante la oran jarcenton per la termino *chofang*, kiu signifas « kuirist-festo ».

La hina manuskripto klarigas, ke la arto rosti aŭ pli bone kradorosti — kiu laŭ mi estas de pli antikva deveno — estis hazarde kaj jene malkovrita:

Iam, vespere, la porkgardisto Ho-Ti, kiel kutime, iris por kolekti glanojn por siaj porkoj. La gardon de sia pajlokovrita dometo li komisiis al sia filo Bo-Bo dika malspertulo, kiu emis ludi per la fajro kiel kutime emas ĉiuj samaĝuloj. Tuj tuj ĉi sin decidis al sia ŝatata amuziĝo: fajreroj elsprucis kaj falis sur pajlgarbon Rapidege la fajro ekkaptis la tutan loĝejon, kaj ĝin cindrigis. Dum la malgajaspekta kaj antaŭdiluva domoĉo konsumiĝis, pli grava afero ankoraŭ okazis: belega naŭnombra porkidaro perdis. En Oriento, la finaj porkoj estis ĉiam konsiderataj kiel valorega luksaĵo.

Bo-Bo bedaŭregis ne la ruinigitan domoĉon, kiun, pere de kelkaj sekaj branĉoj, la patro kaj li kapablis facile rekonstrui en unu aŭ du horoj, sed la porkidaron. Dum li rigardis kun tordigitaj manoj la fumigantajn restaĵojn de unu el la tro junaj martiroj kaj pripensis kion li rakontos al sia patro, ia speciala odoro influis lian flarilon. De kie tia odoro povis elveni? Ĝi certe ne elvenis de la brulinta domo, ĉar li bone konis tian odoron. Ja, ne estis tie-ĉi la unua tiuspeca okazintaĵo kaŭzita de la malatento de tiu juna brulegisto. Ĝi ankoraŭ malpli similis al la aromo de herboj aŭ floroj. Samtempe ia malseketeo kovris lian malsuperan lipon. Li ne sciis kion opini. Li mallevigis per palpi la porkidaron kaj konstati, ĉu ĝi ankoraŭ vivas. Li bruligis al si la fingrojn, kaj por ilin malvarmetigi, li stultmaniere metis ilin en sian buŝon. Pecetoj de rostita porkhaŭto estis gluiĝintaj sur liaj fingroj, kaj la unuan fojon en sia vivo — verdire en la vivo de la tuta mondo, ĉar antaŭ li neniu ĝin jam konis — li gustumis « rostaton »!

Ree li palpis la porkon. Li ne tiom sin bruligis, sed li tamen lekis al si la fingrojn: li jam kutimigadis al tio. Iom post iom lia malinteligenta cerbo malkovris la veron. Li komprenis, ke vere estas la porko, kiu tie agrable bonodoras kaj bongustas. Tiam li komplete ĝuegis tiun por li novan plezuron. Li sin ĵetis al la porko, kaj plemmane forprenis rostitan haŭton kun viando.

Li estas ĝuste pleniganta al si la buŝon, kiam meze de la fumigantaj traboj, kun vengema bastono, ekaperis la patro.

Konstatante, kio okazis, li surŝulte batonfrapis la stultuleton, sed tiu-ĉi ne tute atentis pri tia bato.

La agrabla tikleto, kiun li ekentis en la centraj partoj de sia korpo igis lin tute sensenta pri ĉiuj mala-

grablaĵoj okazantaj en lia ekstera supraĵo. Vane la patro lin batis!...

Li daŭrigis sin plenŝtopi per viando, tiamaniere, ke li ŝajnis sukofiki. Tremante per la tuta korpo, Ho-Ti ekkaptis la abomenindan aferon. Dum li pripensis ĉu li ne devas mortigi sian filon — tiun junan monstron — la porkhaŭto bruligis ilin la fingrojn. Li uzis la saman kuracilon antaŭe uzitan de sia filo, kaj ŝajve li provis la guston de la rostaĵo. Tiu gusto ne malplaĉis al li malgraŭ la grimacoj, kiujn li hipokrite faris. Cion konsiderante (ĉar tie-ĉi la manuskripto estas iom tedega) la patro kaj la filo tute serioze ekkomencis la festenon, kaj haltis nur, kiam ili estis englutintaj la reston de la tuta rostita porkidaro.

Bo-Bo severe postulis de sia patro, ke li ne dissciigu la sekreton, ĉar ili certe estus ŝtonmortigitaj de siaj najbaroj, kiel malsatindaj krimuloj kulpaj esti dezirintaj plibonigi la de Dio donitan viandon.

Tamen strangaj klaĉoj baldaŭ diskonigis en la ĉirkaŭaĵo. Oni estis rimarkinta, ke nun la domoĉo de Ho-Ti brulis pli ofte ol iam. Nur brulegoj okazis ekde kelka tempo! Unuj ekokazis tage aliaj nokte. Ĉiujfoje kiam la porkidino naskis porkidojn, oni estis certa konstati la brulegon de la domo de Ho-Ti, kaj tio, kio estis ĉefe suspekta, estis, ke anstataŭ mallaŭdi kaj korekti sian filon, Ho-Ti, kontraŭe ŝajnis esti pli kaj pli indulgema al li.

Fine oni malkaŝis la abomenindan misteron: la patro kaj la filo estis transdonitaj al la tribunalo de Piking, kiu tiam estis nur urbeto kun krima kortumo. La atestantoj faris siajn deklarojn, la abomeninda nutraĵo estis alportita al la ĵugistaro, kaj oni estis tuj publike legonta la verdikton, kiam la prezidanto de la jura alsidantaro portigis al si en sia stalo, iom de tiu bruligita porko, kiu estis mortinta la akuzon.

Li kaj la tuta jura alsidantaro ĝin palpis, kaj same kiel Bo-Bo kaj lia patro ĉiuj bruligis al si la fingrojn. Kaj ĉar la naturo pensigis al ili la saman kuracilon, kontraŭ ĉia evidenco, spite la akuzo la plej evidenta, kiun ĵugisto iam portis, je la plej granda surprizo de la kortumaro kaj de la urbanoj, fremduloj, ĵurnalistoj, k.t.p., ne forlasinte la stalon kaj sen interkonsilia decido, la jura alsidantaro unuanime proklamis « senkulpa » la akuziton.

La ĵugisto, vera ruzulo, fermis la okulojn, pri la maljustegeco de la ĵugo: kaj tuj kiam la kortumanoj estis for, kaŝite li aĉetis ĉiujn porkojn akireblajn per mono kaj interrilato.

Kelke da tagoj poste la domo de Lia Ekscelenco brulis.

Tia farmaniero rapide disvastiĝis, kaj, baldaŭ ĉiuflanke, oni vidis nur brulegojn. En la tuta regiono, la prezoj de la brulstoj kaj de la porkoj multe plikariĝis. Ĉiuj asekuro-oficejoj, senescepte, fermis siajn ĝiĉetojn. De tiam, oni konstruis domojn kun pliiĝanta senatento. Oni povis antaŭtimi, ke eĉ la arkitektura arto baldaŭ estos tute perdita por la homaro.

Tial, tiu kutimo konsistanta el la bruligo de la domoj daŭradis ĝis kiam, multaj jaroj poste, venis saĝulo kiel nia Locke. Tiu saĝulo faris valoregan elftrovon, t. e. ke la viando de la porko kaj de la ceteraj bestoj povas esti rostita (bruligita, kiel tiam oni kutimis diri) nenecese bruligante por tio la tutan domon.

Nur de tiu epoko datumas la kradorostilo laŭ ĝia origina formo. Unu aŭ du jarcentoj poste — mi forgesis dum kiu dinastio — oni ekkomencis turni kaj ŝnurroŝti. Tiel la artoj la plej utilaj kaj ŝajne la plej simplaj — konkludas la hina manuskripto — malrapide kaj paŝon post paŝo preparas al si la vojon tra la homaro.

Ne tro kredante la tutan historion, oni devas tamen konfesi, ke

Portretoj de Hitler kaj Zamenhof pendas kune sur la muro

Ni ricevis jenan leteron de Esperanto - Grupo « Kolonjaj Tramistoj »:

Kolonjo, la 30-an de Jan, 36.
Tre estimata s-ro Grenkamp!

Vizitante antaŭ kelkaj tagoj la redakcion de « Heroldo de Esperanto » oni tie montris al mi artikolon aperitan en via gazeto « Nia Gazeto » kun la superskribo, « Forigu la portreton de D-ro Zamenhof ».

Traleĝinte tiun artikolon tute mirigite mi devis konstati, ke oni treege malbone informis vin kaj ke la menciitaj « seriozaj Esperantistoj » estas grandaj mensoguloj. Kiel grupestro de la grupo « Kolonjaj Tramistoj » kaj ĉeestinto dum la vizito de ges-roj Walther mi nur povas aserti, ke la tuto estas mensogo, sed la fakto estis jena:

1^o Ni ne aranĝis festvesperon en nia salono okaze de la vizito de ges-roj Walther.

2^o Ili ne vizitis nin vespere, sed lunde antaŭtagmeze kaj ne havante multe da tempo ili nur povis resti en nia ejo eble 15-20 minutojn.

3^o Ĉar je tiu malkonvena tempo nur, krom mi, tri klubanoj ĉeestis, do s-ro Walther ankaŭ ne paroladis, kaj pri la surpendigitaj bildoj de niaj regnestro kaj Zamenhof li diris nenion.

La bildoj ankoraŭ pendas tie, kie ili pendis.

Kredinte, ke tio sufiĉas por konvinki vin ke la tuto estas mensogo, ni estus tre dankaj al vi (se estas eble) havigi al ni la nomon de tiu raportinto, por ke oni povu ekkoni tian danganan homon, tiu per siaj mensogoj semas malkonkordon inter la Esperantistojn.

Samtempe ni petas pri ĝustigo de la menciita artikolo en la venonta no. de via gazeto. Ne necesas dubi pri la supre skribita, ĉar la tri aliaj ĉeestintoj jure povas atesti tion. Samenhavan leteron ni sendis al Heroldo de Esperanto por publikigo, ĉar ni ne volas lasi la suspekton sur ni, ke ni estas la raportintoj de tiu malvero.

Esperante, ke en via gazeto ni trovos ĝustigon kaj se eble ankaŭ la nomo(j)n de la mensogulo(j), ni restas kun sinceraj samideanaj salutoj.

Esperanta-Grupo « Kolonjaj Tramistoj »
komisie: Peter Vosen

Mi estas iom mirigita, ke « Heroldo de Esperanto » ne informis tuj siajn amikojn pri mia artikolo, kaj ke necesis nur posta hazardo, ke s-ro Peter Vosen eksciis pri ĝi.

Mi bedaŭras, ke ni ne ricevis regustigon de s-ro Walter, kio estus multe pli valora en la nunaj cirkonstancoj.

Mi esperas ricevi ankaŭ informon de niaj informintoj. Mi ne povas tamen supozi, ke seriozaj homoj elsciis el fingro la tutan historion.

Se ĝi estus nur simpla mensogo kaj kalumnio, volonte — ni akcentas — ni publikigus tiujn nomojn.

Sed ĉar bedaŭrinde en la nuna Germanujo ekzistas krom rasmurdado ankaŭ provokaj sistemoj kaj sufiĉe larĝe malfermitaj ripoz-centroj, ni ne povus tion fari.

Tamen ni atendas ilian vorton en tiu afero.

S. GRENKAMP.

Pri la sama temo ni ricevis leteron de s-ro Berger (Kolonjo); ĝin ni ne publikigas, ĉar ne nur la tono uzita de la sendinto estas ne ĝentila, eĉ ne deca, sed ankaŭ la letero entenas minacojn al mi, kvankam ili estas ridigaj, ni ne volas, eĉ ŝajne, cedi; cetero la letero de s-ro Berger enhavas pri la afero nenion pli ol tion, kion oni legis en la letero de s-ro Peter Vosen (Rim. de la Direkcio).

LA SAKETO DE REMZI

Falinta linio forigis el nia decembra numero la nomon de la aŭtoro de « La Saketo de Remzi », kies bonegan tradukon faris Hristo Kolarov. Tiun novelon verkis en la bulgara lingvo Hristo G. Kazanĝiev, konata beletristo kaj dramverkisto, kunlaboranta en la plej bonaj bulgaraj literaturaj gazetoj.

se malsaĝaĵo tiel danĝera, kiel tiu konsistanta el la bruligo de la domojn pro kuireco povas esti pravigita per sufiĉa kaŭzo, tia kaŭzo kaj pravigo celadas nur al la porkrostaĵo.

El la angla:
D-ro MALIANCHE.

Lingva Konsilanto

« En « P.E. » (julio) sub « Lingva Esploro », mi legas jenon: anstataŭ *gazbando*, ĉar la originala vorto estas skribata per *j*, ne per *g*, mi opinias pli korekta: *jazbando*. Ĉu la skribinto pravus, *ŝajnas al ĉi, ĥe ĥe.* »

La skribinto eraras, ĉar la plej grava en « internaciigo » t.e. esperantigo de vorto ne estas la origina ortografio, sed la prononco, la elparolo. Oni elparolas la vorton *gazbando* pro tio tiu formo estas la plej ĝusta reprezento de ĝia origino. Nur duonkulturaj homoj, nekonantaj la originon de la vorto, erare prononcas ĝin en sia gepatra lingvo *jazbando*, de tie la erara « opinio ».

Simile, laŭ opinio de multaj, nur senkonsciaj L.K.-anoj povis akcepti la neelparoleblan formon *budĝeto* anstataŭ la ĝusta kaj prononcebla formo *buĝeto*. Pro tio nur naivulo povas proponi por sporta faka vortaro la necesan *knock out* vorton en la formo de *knockouti* anstataŭ la sole akcepteblan — laŭprononce en ĉiuj lingvoj uzatan — *nokaŭti*.

❖

« Mi konstatas uzon de *Etiopio* kaj *Abiseno*, kiu vorto estas ĝusta? »

La ĝusta kaj nur uzinda vorto estas *etiopo*, *Etiopio*. La vorto *abiseno* estas malagrabra kaj ofenda por etiopoj. Ĝi originas el araba lingvo kaj havis ne speciale simpatian sencon. Estas strange konstati, kiom en Eŭropo — spite plurfojaj oficialaj notoj de Etiopio — oni ankoraŭ uzas la vorton *abiseno*, ne povante deĉutimiĝi de ĝi.

❖

« Kial la L.K.-o oficialigis *vinkto* kaj ne *nito*, kaj kial entute ĝi oficialigis tiun vorton? »


Hm, vi tuŝas tre delikatan aferon, sed ĉar mi ne timas eĉ putrajn problemojn, mi klopodos klarigi al vi la aferojn. Unue ne forgesu, ke tiuj seriozemenaj sinjoroj preparas la listojn de oficialigitaj vortoj ne laŭ ia serioza studo aŭ pripenso, ne laŭ ia pri-medito aŭ prikonsiligo, ne laŭ la vera neceso de nia Vortaro, sed — nu, kiel diri, — laŭ « kiel-mivolvas », laŭ « kiel-al-mi-plaĉas ».

Ekzemple unu direktoro de la vortara sekcio malsanetis pro stomakdoloroj kaj pro tio tuta lia atento estis direktita al — diversspecaj infuzoj el kuracaj herboj. Li konis kaj flegis en sia koro la nomojn de tiuj belaj plantoj, el kiuj oni povas fari teajojn. Kaj tiamaniere nia Oficiala Vortaro riĉiĝis per multaj kuracaj herboj kaj plantoj...

Ne necesas aldoni, ke ofte ili ekvidis la unuan esperantan lumon, la unuan esperantan *praktikan* uzon nur per la — oficialigo!

Ĉu mi aldonu, ke bedaŭrinde tro ofte la oficialigado okazadis tiom fuŝe, ke oni ne scias, ĉu la koncerna nomo prezentas specon ĉu genron kaj kiun specon...

Unufoje tia direktoro ne plu povis dormi, kiam li konstatis, ke la moto de lia akademio kolego: « Nia fosilo estas bona, ni fosu nian sulkon! » fariĝis signifoplena frazo, fariĝis nia komuna proverbo kaj batalilo en gravaj momentoj, kiam ni sentas proksimiĝantan danĝeron, kiam ni sen-



Karnavalo en Nice: Sur sia ĉaro la reĝo Karnavalo LVIII veturas akompanata de Venuso mem — Venuso 1936, akordionon ludanta.

tas, ke mistendencoj mordas nian lingvon, nian Fundamenton.

Li tiam tutsimple, — ĉar li ĉiam restis homo de kabineto, teoriulo, tro fora de la movado, de la popolo — enkondukas tutsimple la vorton *neniam antaŭe uzitan* — *ŝpato* kaj — oficialigas ĝin.

Ĉar, kiu atentus la regularojn kaj rekomendojn, ke la Lingvaj Institucioj estas kreitaj por *kontroli* la evoluon de la lingvo, *sed ne ĝin evoluigi!*

Ni ne intencas ĉi-foje tro longe daŭrigi la romanon de nia lingva evoluo, ni do aliru al la demando starigita de vi.

Kial la direktoro de la vortara sekcio proponis *vinkto*? Sincere mi ne scias la kialon. Mi neniam ĝin renkontis ĉe Zamenhof. Estas vere, ke ĝi troviĝas morte kuŝanta en la malnovaj vortaraj de Zamenhof aŭ sub lia kontrolo aperigitaj: esperanta-rusa kaj esperanta-germana. Sed eĉ tie ĝia radiko estas verba kaj ne substantiva.

Kial teorie kuŝantan vorton, apartenantan al teknika lingvo, oni oficialigas, dum kvindeko da ĉiutage uzataj zamenhofaj vortoj ne estas oficialigataj? Al tiu demando, al tiu enigmo eble respondos al vi la direktoro de la vortara sekcio.

Li eble klarigos al vi, kion fine signifas *vinkto* kaj kion *nito*, ĉar li pretendas, ke tiuj du vortoj havas malsaman sencon.

Ni atendas jam sufiĉe longe la respondon. Eble vi havos pli da ŝanco kaj vi ricevos nun la respondon.

S.G.-K.

Afabla Pramistino

Afabla pramistino,
Sipeton lasu do!
Labora ĉi destino
Por vi ja grizas tro!
Sed en kastelo, brilos varma,
Por vi ĉiama sun';
Vi konos riĉon! Venu, ĉarma,
Venu kun mi ja nun!

Ne, ne! Plaĉas pli al mia kor'
La remilo kara
Sur ĉi ondo klara.
Pli valoras la sonor
De la kant' el mia kor'!

Vin, bela kaj infana,
Retenu do neni'!
La vok' ne estu vana!
Feliĉaj estos ni!
Ho, vidu ke, tra mia peto,
Ekridetas Fortun'.
Ne plu hezitu, knabineto,
Venu kun mi ja nun!

Ne, ne! Plaĉas pli al mia kor'...

Al ĉio vi ribelas
Per mokpetola rid'!
Ho, kiom ĝi kruelas
Al mia ama fid'!
Kompatu min pro la sufero,
Vi, amata infan'...
Jen kun fidelo, kun espero
Mia kor', mia man'!

Ha! Ha! Tiufoje, ho sinjor'
— Hej, remilo kara
Sur la ondo klara! —
Jen por vi, jen mia kor'
Amoplena mia kor'!

J. B.

Anekdotoj

LA MAGIA VORTO.

La fama kantistino Lucienne Bréval, kies scenejan juvelaron oni antaŭ nelonge disvendis, estis tre superstiĉa, kaj pri tio oni rakontas la sekvantan historieton:

Ĉiufoje, kiam Lucienne Bréval rolis je l'unua fojo en ia nova teatraĵo, la opereja pordisto devis ĉe la lasta provo, antaŭ ol okazos la publika prezentado, senmanke observi la momenton, kiam ŝi alvenos al la teatro, kaj respektive susuri al ŝi klare elparolata unu... nur unu drastan vorton, kiu por eterne famigis bravan generalon, kaj depost la batalo apud Waterloo estas supozata havigi bonŝancon, kaj forpeli kontraŭan sorton.

Tamen, unu vesperon la pordisto ne plenumis sian mision. Li estis urge vokita en la provincon al malsanega parenco.

Ne elparolata per la kutima trankviliga vorto, Bréval senkonsila, kaplita de tiu terura timo, kiu senigas la aktorojn de ilia tuta kapablo, supreniris al sia loĝio, por tualeti.

Ne povante superforti sian teruron, ŝi atendis tutkorpe tremante la momenton alpaŝi sur la scenojn, kiam grumo alportis al ŝi depeŝon. — « Ha! Dio, jen certe malbona sciigo, eble katastrofo...! » Tremmane ŝi malfermas la faldadon, kaj apenaŭ ŝi ekrigardis la unikan vorton montratan de l'telegramo, tuj ekbrilas ŝiaj okuloj, radias ŝia vizaĝo. La bone inspirita pordisto, ne havante la eblon elparoli la magian vorton al la kantistino, ĝin telegrafis... Kia ĝojo! ŝi estas savita!

Tamen la pruda kaj prudenta postadministracio, nepre dezirante malakcepti respondecon pri tiel stranga kaj malkonvena mesaĝo, estis parenteze aldoninta: « Netuŝita teksto ».

Bréval, kvazaŭ mirakle retrovinte sian kuragon, memfidon, majstrecon, sin prezentis al la publiko, kantis, kaj ricevis triumfan sukceson.

*

NOKTE EN NOVJORKO.

La bandito direktante la tubon de sia revolvero al la esperantista turisto:

— Hands up!

La esperantista turisto:

— Bonvolu permesi, sinjoro, ke mi esploru mian anglo-esperantan vortaron, por trovi la signifon de viaj vortoj.

*

PER LA MONO PERDITA!

Du amikoj marborde:

— Ho! kian belan kaskedon de jaftisto vi surkaphavas! primiras la unua, ĉu vi ĝin aĉetis per la mono gajnita de vi en ludado?

— Jes! per la mono perdit... mi estus povinta aĉeti la jafton.

*

DU BALBUTULOJ.

Unua balbutulo. — Bo... bonan ta... tagon, a... a... amiko, k... k... kiel vi fartas?

Dua balbutulo. — T... tre bone, k... k... kaj vi

Unua balbutulo. — A... a... ankaŭ mi. Sed vi... vi do ĉiam a... a... anko... koraŭ ba... balbu... butas?

Dua balbutulo. — Jes, vi... vi ja s... s... scias, ke... ke mi bal... bu... butadas jam de... de mia infan... fa... faneco.

Unua balbutulo. — Nu! ki... ki... kial vi... vi do ne... ne iras ko... ko... konsulte al la ku... ku... racisto, ki... kiu mal... malbal... bu... bu... ti... tigas min?

ODISEO, PENELOPO, KIRKEO KAJ KOMPANO

La agado havas lokon nuntempe en la subegmenta pentrejo, kies prikribon la leganto figuros al si laŭ sia propra fantazio. Antaŭ stablo, kiu portas skizitan pentraĵon, staras, diskutante: Rafaelo, artisto-pentristo; Oskaro kaj Margenjo, geedzoj kaj gemodeluloj, ambaŭ en antikvaj grekaj vestoj.

RAFAELO, montras la pentraĵon kaj streĉas manon super sia etendita apogilo. — Super ĉi tiu scepro, mi juras, ke vi kreis de mi fiverkon!

OSKARO k. **MARGENJO**. — Ni? Kia aplombo!

RAFAELO. — Jes, vi, vi solaj, kune! Jen la pruvo: mi promesis al vi belajn luidorojn por ke vi prezentu Penelopon kaj Odiseon. Ĉu mi promesis? (konsenta kapmovado de l'geedzoj). Mi plie promesis, ke vi partoprenos mian gloron! (sama kapkonsento). Ĉion vi konfesas!

MARGENJO. — Jes, pri la promesoj. Sed ĝis nun ni vidis nek gloron nek luidorojn!

RAFAELO, kvazaŭ elŝiras siajn vertoharojn. — Senkreduloj dubantaj pri mia genio! Ĉu mi ne baldaŭ famegiĝos? Ĉu mia baptonomo, Rafaelo, ne garantias al vi mian prosperon?

OSKARO. — Intertempe, viaj promesoj ne grasigas nin! Ne tiom komfortigas palpi esperojn, kiom monerojn! Se ne estus pli ol vi mondonaj la nin uzantaj ceteraj pentristoj, pro malsato ni mortuŝus!

RAFAELO. — Mono! En via buŝo tiu ĉi vorto pufigas kvazaŭ balono ĉe gasotubo! Kial insiste zorgi pri mono?

OSKARO. — Por manĝi!

RAFAELO. — Glutemuloj! Ventroj! Vi pli ŝatas la vantaĵojn de la vivo, ol la voluptojn el la famo!

OSKARO. — Mia edzino asertas tute prave, ke pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota.

MARGENJO. — Kaj li prudente kaj inteligente pensas, kiel mi.

RAFAELO. — *Asinus asinum fricat.*

OSKARO, ofendite. — Sufiĉas ne pagi kaj ne nutri! Insulti troas!

RAFAELO. — Mi ne insultis!

OSKARO. — Vi nomis min « azeno afrika »!

RAFAELO. — Tute ne! Mi citis latinon.

OSKARO. — Mi pardonas vin! Neniam helpinte ĉe meso, mi ne komprenis. Sed vi ankoraŭ ne pruvis nian kulpon!

RAFAELO. — Facile! Rigardu kaj vidu!

OSKARO. — Kion?

RAFAELO, montras la pentraĵon per la apogilo. — Vin! Ĉu vi vin rekonas?

OSKARO. — Malbone! La desegno estas fuŝita!

RAFAELO, eksplodkrias. — Fuŝita! Ĉu, de tiam, kiam vi apudas pentristojn, vi ne scias de fuŝaĵo apartigi skizojn?

OSKARO. — Ne granda estas la diferenco.

RAFAELO, kvazaŭ reŝiras siajn vertoharojn. — Buteo! Bruto! Azeno ne afrika! Profanulo! Malnoblo! Provizanto de brokantistaĉo! Amatoro!...

OSKARO. — Kia lavango! Ripozu!

RAFAELO, montras la pentraĵon. — Nu vi, Margenjo, kiu tie ĉi stiligite sidas?

MARGENJO. — Mi.

RAFAELO, piedfrapas. — Ha! Triobla skolopo, kiu vi estas!... Vi, vi! Ĉu vi ne memoras, ke tie ĉi vi estas Penelopo?

MARGENJO. — Ho, jes, se vi ĝin volas! Estas sama afero.

RAFAELO. — Ne utilas insisti!... Kaj kiu sidas sur la dua seĝo?

MARGENJO. — Tiu stulta Oskaro.

OSKARO. — Permesu!...

RAFAELO. — Ne, ne, ne!... Odiseo!... Kion faras Penelopo kaj Odiseo?

OSKARO. — Ili sidas.

RAFAELO. — Sed kion ili faras sidante?

OSKARO. — Nenion! Ili ripozas.

MARGENJO, post malespera gesto de Rafaelo. — Ili interbabilas.

RAFAELO. — Ĉu ili vivas?

OSKARO. — Kia bona ŝerco! (ekridegas). Bildo vivi?

RAFAELO. — Jes, bildo devas vivi, pli ol vivantoj! Car, tial ke oni scias, ke ĝi estas senviva, se ĝi ne pli vivus, oni tuj supozus, ke ĝi mortis... Sajnas, ke vi ne komprenas?

OSKARO. — Ne... ne...

RAFAELO. — Ĉe tiu ĉi pentraĵo, nek Penelopo nek Odiseo vivas!

MARGENJO. — Kial do vi ne vivigis ilin?

RAFAELO. — Ĉu vi ne konscias, sencerbuloj, ke vi estas kulpaĵ pri tio? « Ili » ne vivas, tial, ke i. ne vivis mem!

OSKARO. — Ni ne vivis?

RAFAELO. — Vi sidis tie ĉi, sur tiuj seĝoj. Vi kvazaŭ parolis, sed estis mutaj! Vi kvazaŭ pensis, sed estis senideaj! V. kvazaŭ sentis, sed estis indiferentaj! Vi kvazaŭ spiris, sed estis inertaj!... Kaj, pro ĉiuj ĉi kvazaŭaj fiaskis mia pentraĵo, malgraŭ mia tuta talento, mia tuta lerteco, mia tuta impeteco, mia genio senlima, mia ardeco senegala!...


OSKARO. — Ardeco senegala! Vi ja konfesas, ke ankaŭ en vi estas io afrika!

RAFAELO. — Ha! Vi krute rompita efikon de mia parolo!

OSKARO. — Mi ne vizitadis liceon, kiel



La prineĝitaj montoj proksimaj de Nice je 40 kilometroj ebligas skiadon tra belega, impona pejzaĝo.



vi! Tamen mi konas sufiĉe da naturscienco por scii, ke Senegalo kuŝas en Afriko!

MARGENJO, admiras. — Kiel klera!

RAFAELO. — Silentu!... Ĉe tiu ĉi pentraĵo, vi eĉ ne dormas: vi mortas! Vidu vian senspritan rigardon!

MARGENJO. — Ĉu vere ni aspektas tiom neinteligentaj?

RAFAELO. — Mi juras super mia palestro! Vi tiel malviglis, tial ke vi nek pensis nek babilis. Ĉu malfacile estas diri ion?

OSKARO. — Sed pri kio babilis? Pri aŭtomobiloj, vetkuradoj, kinematografo?

MARGENJO. — Ĉu preferi pri roboj, juveloj, virinbaloto?

RAFAELO. — Ne!... Vi devas animi fidele, kvazaŭ vi estus ili, la personojn, kies vestojn vi surmetis. Vi, Odiseo, parolu pri via vojaĝo al Iliono...

OSKARO. — Sed mi neniam iris tien!

RAFAELO. — Parolu pri Agamemnono, Ahilo, ambaŭ Ahajoj, Diomedo, Filoketo, Nestoro...

OSKARO. — Neniam mi ekkonis tiujn individuojn!

RAFAELO. — Kaj vi, Penelopo, informu vian edzon pri via tapiŝo...

MARGENJO. — Pri kiu tapiŝo?

RAFAELO. — Pri tiu, kiu vi brodis tage kaj malbrodis nokte.

OSKARO. — Kial ŝi tiel malsprite laboris, farinte kaj malfarante?

RAFAELO. — Por konfuzi siajn sopirantojn.

OSKARO. — Kaŝantino, kial vi neniel konfidencis al mi pri tiu sopirado? Tio okazis antaŭ mia edziĝo, mi supozas?

RAFAELO. — Ne, post via edziĝo, dum via vojaĝo.

OSKARO, al Margenjo, severe. — Mi ne scias, kiu vojaĝo estas aludita, sed mi intencas koni tiujn, kiuj flirtis ĉirkaŭ vi!

MARGENJO. — Neniam mi komprenas!

OSKARO, kolere. — Vi profitis mian foreston por amindumi! Kaj ili estis tiom postulemaj, ke vi devis konfuzi ilin!... Iom pridiru la postulojn!

MARGENJO, tedite. — Absurdulo! Mi jam diris al vi, ke vi estas stulta!

OSKARO. — Ne alitemigu! (minacas). Mi volas ekscii la veron!

MARGENJO. — Ĉu mi scias la veron pri viaj kaŝitaj iradoj?

RAFAELO, subridante, al Oskaro. — Jes, rakontu do al via edzino pri via kunamo kun la bela magiistino Kirkeo!

OSKARO, miregas. — Mia kunamo?... Kiu parolis?...?

MARGENJO. — Ha! Vi konfesas! Fripono, kanajlo, fiedzo! Min vi mokas kun kartodivenistino? Kie ŝi loĝas, tiu Kirkeo? Respondu!

OSKARO. — Neniam mi vidis ŝin!

MARGENJO. — Mensogulo! Vi kunamis senvide?

RAFAELO, metas sub brakon la apogilon kaj ĝoje kunfrotas siajn manojn. — Ili vivas, ili vivas!

OSKARO. — Mi juras!...

MARGENJO. — Ne juru malvere! (duonploras; al Rafaelo). Kial li amis tiun virinaĉon? Kion do ŝi faras el la viroj?

RAFAELO. — Porkojn!

OSKARO. — Porkojn?

MARGENJO. — Kaj porkoj ili revenas al siaj edzinoj, malpurigante la hejmon! Kion vi meritas, maldignulo? Ke mi elŝiru viajn okulojn satigitajn per la logaĵoj de via amatinajo? Kaj mi, malfeliĉa, kiu atendis vin senŝaŭmante la buljonon aŭ flikante viajn ŝtrumpetojn! Vi, malpruda, voluptema! Mi venĝos min!

OSKARO, tondrovoĉe. — Viaj sopirantoj, multimulino! Viaj postulemluloj! Ĉu vi malmemoras pri ili?

RAFAELO, rekunfrotas siajn manojn. — Ili vivas, ili vivas!

MARGENJO, al sia edzo. — Hipokritulo! Sangi la temon ne pravigas vin!

RAFAELO, al Margenjo. — Informu lin ion pri via filo Telemako.

OSKARO, saltigante pro furiozo. — Fiedzino, publikulino! Kie estas tiu Telemako, ke mi buĉu lin? (Ĉe ĉiu vorto li frapas ŝin pugne). Senskrupulino, trompantino, krimulino!


MARGENJO, krias ĉe ĉiu ricevita bato. — Maltaŭgulo, malĉastulo, kuraĝulaĉo, kiu batas virinon! (Ŝi ekpapas la apogilon el sub la brako de Rafaelo kaj per ĝi frapas sian edzon).

OSKARO. — Ĉerpitino el kloako!

MARGENJO. — Bruto (ŝi frapas)! Ricevu! (Dum la batalo, pinto de l'apogilo forte trafas la pentraĵon, ĝin diskrevigas kaj faligas).

RAFAELO, vere ŝiras siajn vertoharojn. — Malfeliĉe! (Ĉiam kriegante, insultante kaj batante unu la duan, la geedzoj eliras el la pentrejo; Rafaelo malesperas). Ili tro vivas!!!


EMO.



NI HAVU LA FIDON!




— Kiam esperanto venkos?
— Morgaŭ!



E.R.A.

La bildo prezentas intiman angulon en la propra hejmo de la « Esperanta Rondo Amika » en Budapeŝto. Fondinto kaj prezidanto estas Julio Baghy. La agado de la membroj celas la altigon de la kvalito kaj la harmonian kunlaboron de ĉiuj hungaraj esperantistaj societoj. La membroj estas aktivaj batalantoj, kiuj oferece dediĉas tempon, laboron kaj monon por sukcesigi nian aferon. Ĉiutagaj kunvenoj, diversgradaj kursoj, kaj « Viva Gazeto ». Vizitante Budapeŝton ne evitu la hejmon de ERA, Thokoly ut 28-11-6. Budapeŝto, VII.



En la vilaĝo Levens, apud Nice, la 15-an de februaro Domenico Giletta fariĝis centjarulo. Li tamen ĝue daŭrigas la perpipan sinvenenadon.

VIVU LA REĜO

Ni ekhavis novan reĝolandon en Eŭropo...

Pasiĝinte agrablan kaj dolĉan tempon en Londono, la greka reĝo Georgo revenis al Grekujo, sur la tronon de siaj prapatroj...

Anstataŭ la gustoplena civila kostumo kaj vestaĵo, li surmetis militistan, multkoloran uniformon.

Anstataŭ rigardi la belajn knabinojn kaj aŭskulti humorajn kaj spritajn en londonaj kabaretoj, li estas devigata rigardi nun la duoninteligentajn vizagojn de siaj ministroj kaj aŭskulti iliajn tedajn raportojn.

Kaj ĉio « por la bono de sia popolo ».

Kaj en la historio oni rakontos, kion oni jam diris. Ke la greka popolo forpelis la « demokratajn demagogojn » kaj revenis, post mal-feliĉaj jaroj, al « sia malnova tradicio ».

Ekzistas nenio en la mondo, kion oni ne povas privesti kaj priplumi per belaj, sonoraj, altsencaj kaj sublimaj vortoj.

Eĉ ĉiun fuŝaranĝitan Esperanto-Kongreson oni povas prikaŭti per kalcioĉia rimo ĝis plej majestaj palaŝoj, kiuj vibrigas mil sentojn tra l'koroj de noraj aligantoj al venontaj Kongresoj.

Sed, ni esperas, ke la reĝo ne



Tiu paro da kunludantoj, kiuj ĉesigis siajn petalojn por lasi la fotografiston ilin fotografi, estas nun tute senmalica. Tamen pesimista filozofa povus sin demandi, kiu el ambaŭ, la leon — aŭ la homido fariĝos iam la pli kruela, kaj li eĉ konkludas... sed tion ni ne diru hodiaŭ.

miros, se la grekoj « grekmienos ». Malriĉaj, kiel preĝeja muso, ili subite ekposedis reĝon, ne sciante eĉ, kiamaniere tio tiel fulme okazis.

Ili dume vivuas al reĝo, kaj ni en Eŭropo pliriĉiĝis per unu monarĥio.

La grekaj komunistoj, vidante la belajn ekzemplojn de Sovetio, grandare kaj oficiale bondeziradis al Lia Reĝa Moŝto kaj juris al Li sian fidelecon.

Dank'al kamaradoj kaj monarĥistoj la trono de Georgo estas certigita kaj ni ne povas plendi, ke Eŭropo estas enua.

Ĉiam io interesa okazas !...

Unu fojon la demokratoj pinten supras, alfoje al komunistoj kaj monarĥistoj kune batas kor' por ĝojo...

S. GRENKAMP.

AMA KANTO

Laŭ Robert Burns,
melodio de Felix Mendelssohn-Bartholdy

Se en ventego kaj sufer'
mi vidus vin,
Mi firmus vin kaj el danĝer'
mi gvidus vin.
Kaj se konsolon en dolor'
bezonus vi,
En mia brak' ĉe mia kor'
ĝin donus mi.

Se min ĉirkaŭus dezertej'
sen sunradi',
Gi iĝus paradizo, se
ĉeestus vi.
Sed eĉ se brillus ĉiu riĉ'
de l' ter' por mi,
Mi estus tamen sen feliĉ',
se mankus vi.

KARL VANSELOW.

AUTUNO

Sur arboj la folioj flave palas,
Unu post alia fluge falas.
Folioj flavas, folioj falas,
Falante funebradas.

Birdeto orfa sidas silenteme,
Flugas ĉirkaŭ ĝi folioj ĝeme.
Birdet' ne flugas, birdet' ne kantas,
Silente funebradas.

Malĝoje nin salutas la aŭtuno,
Gemas ĉio sub la pala suno.
Folia ĝemo sur kalvaj buloj,
La ĝem de malriĉuloj.

Paŝtisto juna staras kapklinante,
Preterflugas lin la vento kante.
La kampo nudas, la pluvo ploras
Paŝtista kor' doloras.

Sur arboj la folioj flave palas
Unu post alia fluge falas.
Folioj flavas, folioj falas,
Falante susuradas.

EMBA.

Pri la "Plena Gramatiko"

K. KALOSCAY, G. WARINGHUIEN : *Plena gramatiko de Esperanto, Vorto kaj Frazo.* — 372 paĝoj, formato 23,5 x 15,5 cm. — Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt-IX, Mesteg-u 53 (Hungarujo). La unua volumo de la Ligvoserio de AELA 1935. — Prezo : broŝurita sv. fr. 8, — ; bindita, 9,50 ; sur luksa papero kaj en ledimita bindo, 10,50 (plus 10 % por sendkostoj).

Prof. W. E. Collinson, recenzante tiun libron en *LINGVO LIBRO* (n-ro 3, 1935) diras : « Kompreneble ĝi ŝuldas multe al la laŭdinda reviziado de la esperanta verko de Fruictier, farita de Grenkamp-Kornfeld, pionira verko, kiun la nuna gramatiko grandskale etendas kaj kompletigas ».

Sed vane vi serĉus en la tuta gramatiko eĉ citon de tiu « pionira verko ».

La aŭtoroj en sia Antaŭparolo, diras, ke ili sekvas la principon : « konstati kaj ne proponi ».

Forgesante tamen eĉ aludi, ke tiu saĝa principo ne apartenas al ili, sed, ke tiun principon, ne menciante la fonton, ili prenis de — Fruictier.

Cetere, kiam vi iom pli serioze trafolumos la verkon, vi konstatos, ke ili ne ĉiam sekvis tiun principon en siaj « etendo kaj kompletigo ».

Estas klare, ke granda verko, pli teoria ol praktika, postulus multajn paĝojn por kompleta, detala kritiko. Ni konas la emojn de aŭtoroj, ne estas do mirinde, ke sur ĉiu paŝo ili proponas, kion ĝis nun oni eĉ neniam konstatis.

Estas do multaj proponoj prenitaj el la jam flavigintaj paĝoj, kiujn la aŭtoroj revivigas, opiniante, ke per ilia rekomendo, la koncernaj formoj ekbrilos en la lingvo.

Cetere la aŭtoroj, ofte sprite, nur kondiĉas kaj seas ĉe enkondukoj kaj iom tro futuristaj proponoj, por tiamaniere iom malfortigi jam antaŭe la eventualajn kritikojn por tiuj novkreitaj snobismoj.

Tro ofte la aŭtoroj enkondukas tute novkreitajn, « sciencozajn » fakterminojn. Ĉe samtempa, tre komplika kaj peza lingvaĵo, multaj reguloj kaj klarigoj ne ĉiam estas kompreneblaj eĉ por homo interesiganta pri la gramatikaj kajoj. Jen la riĉeco de enkondukitaj afiksoj : *ĉisi, -lko, -ito, -ala, eskas, -iva -oza, -oido, retro- -ifi* ; krome serio da *pseudoprefiksoidoj* kaj *pseudoprefiksoj*, *logio, grafio, aŭto* (ekz en *aŭtografio*), *pre* ; *anti, epi* (ekz- en *epilepsio* kaj — *episkopo* !!!)

La aŭtoroj diras -cetere ripetante tion, kion diris aliaj aŭtoroj jam antaŭ pli ol tridek jaroj — ke ili enkondukas

la novajn afiksojn « pro la formo aŭ pro la longeco ». Ĉu do la trisilaba *-oida* estas ekzemple pli mallonga ol la uzo de la dusilaba vorto *-forma* ? Ĉu pli beŝona ? Ĉu *-iva* nepre pli aminda -ol *-pova* ? Ĉu *-oza* nepre pli ĉarma, ol *-riĉa* ?!

Stranga uzo de kelkaj prefeksigemaj radikoj estas konstatata : *ekesperantisto* (?), *forpareno* (?), *levankam* tia uzo (en kia senco ?) ne estas praktikata.

La aŭtoroj tute erare kaj malguste fraldas la *a-* finajon, por la virinomoj kaj tute false bazas ĝin sur la *-zamenhofa* uzo !!!

Nome Zamenhof uzis la formon *Marta*. Sed tio ja estas simple neesperantigita pola antaŭnomo de la heroino. Zamenhof ofte uzis neesperantigitajn nomojn. Sed el tiu pola antaŭnomo trude fiksi regulojn estas ankoraŭ tre malproksime !!!

Kaj tute malguste la aŭtoroj pretendas, ke en ĉiuj lingvoj la antaŭnomoj finiĝantaj je *-a* estas virinaj.

Jen hazarde mi serĉas kaj trovas jenajn *virajn* antaŭnomojn : *Mattia, Jorma* Huttunen (fama finna kantisto) ; jen poloj : *Rola* Rozycki, *Doliwa* Jamiolkowski, jen franca : *Nicolas* (legu : *Nikola*) ; jen fama rusa aŭtoro : *Ilya* Ehrenburg, jen franco *Sera* Martin, jen eĉ esperantisto : *Ovadja* Kupperman ! Mi malfermas francan kalendaron kaj trovas sanktulojn : *Oplat, Sabas, Thomas, Honorat* (prononcu : *Opla, Saba Toma, Honora*) !

Kaj skribi kvazaŭ oni parolus pri jam malnova pasinteco, ke « por la virinaj nomoj oni uzis ankaŭ la sufikson *-in*... » kaj ke nun « la virinaj nomoj ricevas la *a-* finajon » ne estas objektiva konstato, sed nur malgusto, nur subjektiva pia deziro de la aŭtoroj.

Kompreneble same ni ne konsentas kun tre multaj aŭtoraj teoriaĵoj kiel malrekomendo de *ĉiu ajn*, kiu havas ja tute alian sencen ol *iu ajn*, de *unu* kiel nedifina adjektivo, kiun tiom ofte uzis guste Zamenhof dum siaj lastaj jaroj, de *sovaga post ol*, anstataŭ ĝis nun prave uzita *post kiam*, de *pro ke, ol ke* ktp. ktp.

En sia « etendo kaj kompletigo » la aŭtoroj eĉ tro ofte komplikas la simplaĵojn de la esperanta gramatiko per senĉesaj proponoj kaj malaprobaj de la ĝisnunaĵoj formoj, kiujn la esperantistoj uzas ne kaporompe, sed simple imitante la lingvon de l'Majstro.

Sed estas klare, ke spite ilia klopodo, peno kaj laboro, spite ilia trudema mo-



Por kio tiuj atentemaj junulinoj beŝtile sin ekzercas en la boksarto ? Ĉu ili estas esperantistinoj, kiuj, pretendantaj eniri la gvid-konsilantaron de la esperanto-movado, penadas akiri nerifuteblajn argumentojn por certigi al si la lastan vorton en iom varma estonta diskutado ? Aŭ ĉu ili sin lertigas pri la efikaj rimedoj havigi al si mangojn, seĝon, teon, ktp. dum venonta postkongresa krosado ? Aŭ ĉu, simple, ili estas fianĉinoj, kiuj antaŭvidas, ke iafaje la pugna perforto povas ludi kvietigan rolon en la geedza vivo, kiam ekzemple, je la tria matene temas pri la ŝanceliĝo de malfruiĝinta edzo ? Sed kial tiel malice supozadi, kaj kial ne pensi, ke tute naive la boksarton ili kulturadas nur por... la arto ?

havado, tiuj diversaj formoj tamen ne havas la ŝancon ekvivi. Ni estas konvinkitaj, ke ili restos ankaŭ nun, nur teoria balasto, kiun cetero esperanto trenas post si preskaŭ ekde sia ekzisto.

Estas klare, ke ĝuste tiuj novaĵoj-malnovaĵoj regrupigitaj kaj kunigitaj kun aliaĵo plaĉas al la amatoroj de la novismo kaj de neologismoj.

Ĝojante trovi ekz. serion da novaj vortoj, kiuj devas anstataŭi la malvortojn, ili eble plendas, ke tiu listo ne estas ankoraŭ pli abunda.

Por ni ĉi tiu nombro jam estas tro ampleksa Mi pli ŝatus du rimajn poemojn malpli en nia lingvo, ol kvindek pliajn radikojn en nia vortaro.

Kvankam, finfine, por kontentigi eble dekon da personoj ni kreu specialan poezian vortaron por tiu deklaro. Eble tio trankviligus ilin kaj ankaŭ — nian lingvon.

Estas sufiĉe strange, ke la aŭtoroj envidigas spite al prepozicioj, sed tamen ili uzas kaj rekomendas uzi ĝin kun alia prepozicio aŭ akuzativo. Kial?

La aŭtoroj diras: « La ĉefaj verboj, kiuj postulas post si de-objekton, estas: aĉeti, ...gardi, ...kaŝi, liberigi, preni, rabi, ŝteli » kaj tamen oni diras tute korekte: mi aĉetis ion al tiu; vi gardis ion pro mia plezuro; ŝi kaŝis pomon antaŭ mi; li prenis libron al li; ŝi rabis ĉion por li; la ŝteliis la ringon pro ŝi.

Sur la paĝo 194 la aŭtoroj diras: « ami, envidi... ŝirmi k.a. estas verboj de daŭro sen rezulto. Ĉe ili oni ne uzas la rezult-subsencajn perfektajn formojn », kaj nur iom pli malproksime sur la paĝo 198 ni legas: « ni estas ŝirmitaj de la duno kontraŭ la vento »

Sur la paĝo 200 ekz. oni legas « sed la demonstrativon akuzativan konsilinde estas konservi (oni trovas tamen kelkajn ekzemplojn de ellaso precipe en la poezio: Plenumiĝis, kion mi antaŭdiris).

La citita ekzemplo estas malĝusta, ĉar en la supra frazo mankas tio sed ne tion.

Trafoliumante la libron de Kalocsay kaj s-ro Waringhien, oni tuj sentas, kiu skribis la koncernajn paĝojn.

La unua analizas ĉiam facile, pli klare, per lingvo agrabla, la alia per lingvo peza, tro peza, ofte nur mal-facile komprenebla.

Dum la tuta verko la aŭtoroj proponas novajn vortojn jen: masklo, boko, stalono, meretricio, gorgono, paseo, adjekto, prepozitivo, moroza, basa, dorsaŭ, turpa, dina, sinistra, loza, pigra, magra, tarda, poltrona (havanta nenion komunan kun pola trono!) softa, streta, sordida, frida, dista, poka, men, aspra, lasciva, indefinito, interrogativo, kompletivo, prepozitivo, durativo, inkonkativo, asonto, isalo, volitivo, momentaneo, faktitivo, iterativo, traktativa, parlamenta, neĝi, oponi ktp.

La aĉeto de franca vortaro, aŭ pli ĝuste la lerno de franca lingvo estos necesa por kompreni la simionajn aŭtorojn.

Ne tro praktika, tute ne klasika, tiu verko liveras abundan materialon por rediskuto pri aferoj, kiuj dum kelka tempo ekdormis, ĝi refreŝigos espreble en kelkaj la emon al esplorado de la teorioj de de Saussure, kiujn lerte analizas Kalocsay.

La tempo eble permesos al ni pripa-roliti ĉeokaze kelkajn pli gravajn punktojn de tiu verko, iom pli detale ol tio estas eble en mallonga recenzo.

Detala indekso faciligas la serĉadon kaj tiujn, kiuj multon ne komprenos, ni povas trankviligi per la frazo de Kalocsay: « Por paroli perfekte la lingvon, tute ne necesas, ke oni lernu parkere ĉiujn ĉi regulojn kaj analizmetodojn. Dio gardu! »

S. GRENKAMP.

La Kavaliroj de la Paco

Interesan artikolon skribis hungara revuo pri protestanta hejmo de kapitano Bach en La Bercarderie proksime al Neuchâtel. Tie kunvenis dum somero dum unu monato junularo el diversaj nacioj kaj sekvante la ideojn de Kristo ili deziris esti « kavaliroj de la paco » amikigante kaj kune pritraktante reciproke siajn mankojn, erarojn kaj kutimojn. Tiamaniere interparolis kaj konatiĝis germanoj kun francoj, hungaroj kun ĉeĥoj, ne parolante pri malarmado, kontraktoj, sed pri la evangelio. Poste vizitis ilin pli aĝaj diverslandaj amikoj de la movado. Estus interesa scii, ĉu Esperanto estas uzita en tiu ĉi vere internacia interkompreniga agado. Eble kelkaj, kiuj loĝas proksime, foje mem vizitos la saman francan kapitanon, kiu nun simile laboras por repaciigi la naciojn tra la animoj de la junularo. — M. V.

Kuracista angulo

La edziĝo inter fratofilaj kuzoj kaj kuzinoj.

Nemalofte la kuracistoj estas polataj liveri sian opinion pri la laŭgeco, aŭ la nelatŭgeco, de projektata edziĝo inter fratofilaj gekuzoj, vidpunkte de la ŝanco de la ebla estonta idaro. Estas kuracistoj, kiuj ĉiam, sisteme, malpermesas tiajn edziĝojn; estas aliaj, kiuj ilin permesas se ne ekzistas, ĉe la gepatroj, evidentaj sandifektoj. Kiuj pravas? Eble ne ŝajnos senutile al la legantoj de « Nia Gazeto » iom studi la aferon kun ni.

Oni faris statistikojn pri la ŝanco de la idaro devenanta de tiaj edziĝoj, sed tiuj statistikoj estas malsamaj. Dum en unu oni konstatas grandan proporciojn da diversaj gravaj difektoj, surdmuteco, idioteco, leporlipeco, k.t.p., en alia, kontraŭe, oni konstatas grandan proporciojn da sanuloj. Do, neniu certa konkludo povas esti elirita el la statistikoj... (pri tiu temo same kiel en multaj aliaj).

Ne same estas pri la eksperimentoj ĉe la bestoj, eksperimentoj de longtempe faritaj; ili liveras al ni interesajn dokumentojn. Tre ofte, ĉiutage, oni sekskunigas idojn el samfoja naskitaro; ne plu temas pri kuzo kaj kuzino, sed pri frato kaj fratino, do, tie-ĉi, ekzistas vera, kompleta sampatreco. La eksperimentoj estas farataj ĉe kunikoj, ŝafoj, ĉevaloj, kobajoj, k.t.p. Oni ĉiam konstatas ke, se la unua paro (gepatroj) estis tute sana kaj sendifekta, se ankaŭ la dua paro (frato kaj fratino) estis tia, la idaro de tiuj-ĉi estis bona kaj sendifekta.

Oni rajtas sin demandi, kial ne estus same ĉe la homoj. En infereza artikolo, aperinta en la Lille'a ĵurnalo « La Dépêche », d-ro De-lassus, estimata profesoro, referis pri la loĝantaro de « Le Portel », urbeto apud Boulogne-sur-Mer; tie, la edziĝoj inter gekuzoj estas tre oftaj, kvazaŭ kutimaj. Tamen la idaroj estas ĝenerale sanaj, ĉe fortaj. Oni ankaŭ povas rememorigi ke, antaŭ ne longe, oni arestis en Vieno (Aŭstrujo) indignindan patron, kiu, de propra filino, havis kvar infanojn, ĉiujn bonsanajn.

El tio, ĉu ni rajtas konkludi ke, fakte, la sampatreco ne gravas? Jes, sed ni devas aldoni (kio gravas, kio gravegas) « se la gekuzoj estas tute sanaj, se iliaj gepatroj al ili ne transdonis sandifekton ».

Oni ne forgesu, ke la difektoj, la sanmalbonaĵoj, ekzistas en la plimulto de la familioj; en tiu-ĉi, ekzistas tuberkulozemo; en tiu, sifilo; en alia, hemofilio, k.t.p. La sifilo estas tre ofta, kaj nemalofte la interesuloj ne scias, ke ili estas sifiluloj, sekve ili ne estas kuracitaj; por la idaro la konsekvenco povas esti terura; ĉiuj kuracistoj povas citi multajn tiajn kazojn de si observitajn. Bedaŭrinde la sampatreco tre danĝerigas la malbonajn heredaĵojn. Vi do komprenu, kial la kuracistoj estas plej ofte singardaj, kiam oni petas de ili konsilon pri projektata edziĝo inter fratofilaj gekuzoj. Garantii belan, sanan idaron al tiaj geedzoj estas ĉiam ni diru pli juste: plej ofte, danĝera prirespondeco. Ofte ili ne konsilas tiajn edziĝojn kaj se ilin ili permesas, tion ĝenerale ili faras nur kun rezervo. Se ili malpermesas ilin, ne malofte okazas, ke la geamantoj malobeas... sed la respondeco de la kuracisto estas liberigita.

Pine mi konfesas, ke la herede-

NI FUNEBRU

JOHN MERCHANT

John Merchant, la bona koro, la gaja homo, la serena animo, la fidele amiko, la sindona batalanto por nia afero foriris de ni, lasante post si multe da malĝojoj, multe da bedaŭro.

Simpla kaj modesta, li atingis per memlernado, per forta volo kaj energio ĉiun pli bonan ŝtupon en sia kariero, en sia vivo.

Simpla oficeja knabo, li sukcesis per laboro super si mem atingi fine la plej altan postenon en la sama firmo, fariĝi ĝia direktoro. Ĝi pravas ne nur tion, ke volo de homo povas ĉion atingi, sed ke ekzistas en la mondo firmoj, kiuj atlastas al pli altaj rangoj siajn oficejajn knabojn, se iliaj kapabloj kaj laboro tion meritas.

John Merchant laboris multe kaj en siaj lastaj jaroj oferis volonte sian tempon por nia movado.

Prezidinto de la Brita Esperantista Asocio kaj prezidinto de I.C.K., li faris ĉion por kiel eble plej bone povi utiligi sian sperton al nia movado.

Al lia edziĝo kaj filo, al lia tuta familio kaj al la brita esperantistaro ni esprimas tutkoran kunsenton. — S.G.K.

ROBERT KREUZ

Antaŭ nelonge mortis ankaŭ Robert Kreuz, direktoro de U.E.A., kiu dum la tuta daŭro de I.E.K., kies direktoro li estis, montrigis sperta kaj lojala helpanto de la bedaŭrata John Merchant.

Kreuz estis homo tre laborema, posedanta nediskuteblajn teknikajn kapablojn kaj sperton. Pro lia forpaso la esperanto-movado suferas gravan baton.

CHARLES RICHET

Pasintan monaton mortis en Parizo prof. Charles Richet. Li estis 85-jara, kaj fame konata en la tuta mondo.

Profesoro ĉe la Medicina Fakultato en Parizo li estis membro de la Franca Instituto. En 1913 li ricevis la Nobel-premion por Medicino. Pioniro de la aviado, subtenanto de ĉiuj altideaj movadoj, li konsekvence fariĝis adepto de la helplingvo internacia. Du el liaj libroj estis tradukitaj en esperanton kaj li mem neniam preterlasis okazon propagandi por nia afero.

co obeas al leĝoj, kies parton ni konas pli bone nun ol iam, sed nur parton. La antaŭvidoj ne ĉiam estas konfirmataj. Persone mi konis viron, kiu de sia unua edziĝo, kies kuzo li estis, havis kvin infanojn, inter kiuj tri surdmutulojn. En la aĝo de tridek-kvar jaroj li fariĝis vidvo; li reedziĝis kun sana, 25-jara fraŭlino de kiu li havis kvar infanojn, kiuj estis ĉiuj tute sanaj. Mi devas konfesi, ke se de mi oni estus petinta konsilon, mi ne estus permesinta tian edziĝon.

D-ro BRIQUET.

Tra la Gazetaro

Fino J. Supleĥova apartenas al tiuj konstantaj, fidelelaj propagandistoj, kiuj, malpli blufante kaj pli aktive laborante, fosas sian sulkon inter la ĉefa gazetaro, aperigante regule esperanto — kronikojn kaj — rubrikojn.

La ankaŭ en MESIGNI ZPRAVODAJ, organo sendata senpage al ĉiuj lernejoj ĉe en VĀRODNI POLITIKA, grava ĵurnalo aperanta en Praha, ŝi aperigas longajn rubrikojn.

DE PUBLIEKE OPINIE, granda nederlanda semajnuolo, enkondukis ankaŭ konstantan esperanto-paĝon, redaktada de O. Kupperman.

LIGILO aperis per sia januara en pligranda formato: la knabo fariĝis junulo. Ni povas nur deziri pluan ŝancon al la bone redaktata kunfrato. Interesa kaj atentinda artikolo: Bitancoj kaj perspektivoj rilate al U.S.A., ke ĝi montru, kion ĝi faras, englutante grandajn sumojn. Kaj tre esperantisma, tiu de Th. Kilian: Ĉu estas esperanto nur lingvo? Li diras, ke al Zamenhof.

« La lingvo, ĝia akcepto kaj disvastiĝo, ĝia praktika uzado kaj servado ne estis la celo de lia tutviva klopodado, al kiu li dediĉis ĉiujn siajn fortojn, sian genion, sed antaŭ ĉio sian koron. Ne, en esperanto kaj ĝia praktika flanko li ne vidis la celon, sed nur rimedon al intergenta kaj interpopola repaĉigo, kiun li esperis atingi per neutrala al neniu popolo apartenanta lingvo. Lia celo estis multe pli alta ol la profito, kiun tiros komercistoj kaj fotroj el la tutmonda disvastiĝo de esperanto. Amo al la homaro, kaj la arda deziro fargi la murojn, kiujn starigis inter la popolojn la reciproke nekomprene kaj malamo, jen lia celo, jen la fonto, el kiu li ĉerpis la forton al la superhoma laboro. Amo al la homaro, jen la risorto, kiu lin pelis antaŭen, kiu faris el lia tuta vivo longan ĉenon da suferoj, kies lasta ĉenoro estis lia morto. Sen tiu ĉi estimo kaj amo al la homaro Zamenhof estus neniam fariĝinta aŭtoro de la lingvo esperanto; ĉar ĝuste tiu ĉi amo estis la semo, el kiu la lingvo ekgermis. Li ne pensis pri profito. Lia koro revis, ke la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian, ne profiton, sed sanktan harmonion promesas lia lingvo al la mond'eterne militanta. Ni do havas du difinojn de l'esperantismo: unu Zamenhofan neoficialan, nian himnon kaj unu oficialan, la Bulonjan Deklaracion. Kiu el ili ludis kaj ludos estonte la gvidan rolon? Tiu ĉi demando respondu viaj koroj kaj konscienco! Sed unu fakto estas nerefutebla: Sen la unua esperanto ne estus ĝisvivinta la duan!

Jes, la Bulonja Deklaracio estis necesa, por ke ni ne respondu por ĉiu esperanton hazarde lerninta trompisto kaj fiulo. Sed kial vi, amikoj lernis esperanton kaj restis fidelelaj al nia movado? Dum miaj radio-kursoj mi ricevis multajn leterojn de miaj aŭskultantoj kaj preskaŭ ĉiuj skribis pri la alta ideo, kiun esperanto promesas efektive. Nenecesa precize difini tiun ĉi ideon, vi ĉiuj sentas ĝin. Kiam mi pensas pri mia esperantistiĝo mi ĉiam devas pensi pri konata fizika fenomeno: kiam oni ludas violonon, alia violono eksonas per la sama tono, sed nur tiam, se ili ambaŭ estas same agorditaj. Jen la klarigo de l'fakto, ke homo allogita per la praktika flanko de eterne vivaesperanto estas ordinare la unua, kiu ĝin forlasis. Nur tiu esperantisto restas fidelel kaj koro, adante la fortan vokon, harmonie eksonis kun la eterne viva koro de nia majstro. Ni ŝajnas al mi, tro persiste parolas pri la facileco de nia lingvo kaj la homoj eniĝas, ĉar ĉiu infano jam aŭdis, ke esperanto estas lingvo facila. Ni ekkantu, hore ni ekkantu, ke tra la mondo iras forta voko kaj la orelo de l'mondo ekakŭskultas, ĉar malgraŭ ĉio ne la cerbo sed la koro decidis finfine pri ĉiu kultura ideo kaj ĝia sorto.

Jes, ni akcentu propagandante esperanton ĝian facilecon kaj utilecon, sed ni samtempe forte substreku ĝian paŭlgan forton inter la gentoj kaj popoloj. Sed por ke nia aserto ne estu vortoj malplena, ni mem devas antaŭ ĉio pruvi ĝian verecon. Tial mi ĝoje aplaudas la taskon plenumotan de tiu ĉi kongreso: fondi esperantan asocion en Ĉeĥoslovakujo kaj mi ekklore deziras, ke la nova asocio fariĝu agrabla hejmo kaj komuna laborejo al samideanoj apartenantaj al ĉiuj popoloj, kiuj loĝas en tiu ĉi ŝtato.

Malgraŭ la ondoj de l'iminanta milito, ni kun miro kaj ĝojo povas konstati, ke tamen la plej multaj kulturaj popoloj deziras la pacon kaj abomenas la militon. Tiu ĉi pacemajn popolojn ni gajnos por esperanto nur tiam, se ni pruvas al ili la paŭlgan forton de nia lingvo. Kaj nur tiam plenumos la lingvo esperanto sian destinion, kiun donis al ĝi ĝia kreinto. La tutmonda solidareco kaj amika kunlaboro de la esperantistaro estas nia plej elokventa kaj plej konvinkiga argumento. Ni uzu ĝin kaj esperanto venkos!

En HISPANA EPERANTO-GAZETO (januaro), s-ro Fernando Redondo parolas pri Mokemaj proverboj laŭ artikolo de Eusebio Blasko, hispana ĵurnalista, per kiuj unu popolo mokas pri aliuo. « Nur esperanto ne estas kalumnia lingvo » eldiras, bedaŭrinde naive, s-ro Redondo. Kara samideano ekvojaĝu al U.E.A., repensu al ĝi, subakŭskultu tra la pordego aŭ kiel ruŝo

sur direktora tablo, rediru al vi iom la antaŭan historion kaj la morojn de la U.E.A.-estraro kaj tiam vi certe povos « fieri », ĉar ankaŭ esperanto montriĝis « perfekta » lingvo al kalmundoj !..

LA SUDA KRUCETO (decembra) aperas hektografie en esperanta aŭstrala dialekto !


Cetere ni vere ne komprenas, kial, eĉ en Aŭstralio, kie ekzistas deko da esperantistoj oni jam bezonas — dialekton ? Stranga estas la esperantistaro ĉiu dua tipo, se li estas normala, nepre bezonas ion — nenormalan...

Prave plendas Era en sia Flugfolio (januara n-ro), pri la pioniroj de la Verda Stelo, kiujn lastatempe ekposedis nova frenezo, nova furiozo — ekfuŝi nian himnon !!

La aŭstralia esperantisto anstataŭ propagandi esperanton bezonas eldoni hektografian por — povi uzi « novaĵon », dank'al kiu esperanto venkos la mondon ! *Di, da, de, je...* vi iras ?

Cu ne pli bone estus alie uzi vian monon, vian tempon kaj vian talenton ? Dedida, dadide, dididi, dadaje...

ANTACEN!, la vigla bulteno de la Esperantista Grupo en Dunkerque, aperigis en sia januara numero bonan tradukon de « Magali », la konata provenca popolmelodio. La tradukon lerte faris A. Caubel, kiun ni gratulas. Ĝi estas dediĉita al nia direktoro, kiu dankas.




LA PLEJ OFTE TRADUKITA AUTORO

La plej nova foliumo de la *Index translationum* (1) enhavas interesajn sciigojn pri la en la jaro 1933 faritaj tradukaĵoj en la diversaj landoj. Laŭ ĝi aperis entute en ĉiuj kulturŝtatoj 5866 tradukitaj verkoj, la plej multaj — 930 — en Italujo, 662 en Francujo, 659 en Sovetio; poste sekvas Grand-Britujo, Usono kaj Germanujo. Rilate la lingvon, la vicordo estas alia. En la unua loko troviĝas la angla lingvo kun 1620 tradukaĵoj; sekvas la germana kun 1252, la franca kun 734, la rusa kun 559 kaj — la latina kun 163. La anglaj verkistoj do estas la plej multe tradukitaj; inter ili sur unua loko troviĝas *Edgar Wallace* kun 82 tradukaĵoj. Post li venas *Pelham Grenville Woodhouse* kun 31 kaj sur la tria loko *Dickens* kun 25. Laŭ tio do Wallace estus trioble pli populara ol la aŭtoro de « David Copperfield », se oni ne pripensus, ke Dickens registras la 25 tradukaĵojn nur 75 jarojn post sia morto.

F.W.V.

(1) Eble estas interese noti, ke unu el la kunredaktintoj de tiu verko estas nia kunlaborantino, s-ino M. Fallot (*Rim. de Redakcio.*)



REDAKCIA KESTO

S-ro Johannsen. — Ni ricevis du ekzemplerojn de via hektografajo, sed ĝia malklareco ne permesas al ni ĝin legi, sen eventuala malbonigo de nia vidorgano. Pardonu do, ke ni ne povas preparoli ĝin.

Sur la kovrilo, vi diras : *La tria internacio donis ekzemplon de kuraĝa revolucio.* Cu do, laŭ vi, la tuta tasko de Internacio estas fari revolucion kaj nenion por la popolamasoj ?

Cu la revolucio baziĝas sur tio, ke kion hieraŭ oni opiniis malbona, burĝa, oni opiniu hodiaŭ jam proleta ? La revolucioj (ŝajnas al ni laŭ historio kaj laŭ la praktiko de la lasta), estas, por ke certa nombro da ĉefoj kaj demagogoj atingu poziciojn kaj postenojn, por ke ili mem povu daŭrigi la ekspluatadon de la popolo.

Sed mi konsolas vin : ĉiam tiel estis kaj ĉiam tiel estos, ĉar la popolo ĉiam estas stulta. Kontinuu do vian laboron, eble vi atingos la celon povi esti la ekspluatanto. Kaj se vi faras la laboron kiel blinda idealisto, mi gratulas al tiuj, kiuj scelpovos elproffiti vian laboron ! *Simpatian, neekspluateman saluton !*

Tra la Libro

Librojn duokzemple ricevitajn ni recenzas aŭ memcias; librojn unuokzemple ricevitajn ni nur memcias.

ESPERANTAJ HISTORIETOJ de Peter Frey, unua eldono, formato : 13,5x19,5 cm, 48 paĝa. Prezo : fr. fr. 3,50 Havebla ĉe la aŭtoro, Clausensvej 26, Haderslev (Danujo).

Kolekto da historietoj, facila legajo uzehla dum kursoj. Preso, papero bona.

DEDDU POETOJ, redaktis K. Kalocsay. Formato : 11x15 cm.; 126 paĝa. Eldonis : Literatura Mondo. Prezo ne menciita, 1934.

Tiu ĉi antologieto prezentas al nia publiko dekdu poetojn, diversajn laŭ nacieco, medio, aĝo kaj — talento. Plej parte la kolekto konsistas el poemoj jam presitaj en *Literatura Mondo* kaj aliaj gazetoj. En antaŭparolo s-ro Kalocsay donas kelkajn biografiajn kaj privatorajn notojn pri ĉiu poeto.

Belega kaj kortuŝa, plene emocia estas la *Vivraporto* de Szilagy. Oni sekvas kun korŝiro la vivon de aŭtoro :

*Junaĝe mi ja panon havis,
Eĉ truaĵn ŝuojn sur pied' !...
Kaj ankaŭ poste, dum mi estis
Lejnano de la gimnazi' !
Mi ĝuis nur en fantaz' !
Sekvas zorgoj, « kie prenu
Gepatroj monon por la fil' !*

Li sukcesas la ekzamenojn kaj havas diplomojn. Li fariĝas fine post la mondmilito bankoficisto.

« La bankoj « sparas ». Mi... sur ŝpara list'

*Nun sekvis sango el la pulm'
Edzino, Par' sub sorta fulm'
Sen mono, sen esper' sen sano,
Sen ia ŝanc' de bona nov'
Elburĝo — diras Nekrasov !*

Citante nur kelkajn verserojn de Szilagy, mi povas diri, ke ankaŭ multaj aliaj poemoj meritis citadon.


Hovorka per kelkaj poemoj montras vivan inspiron al *Amindaj junaj amikinoj...*

Hilda Dresden melankolias pri la bonoj.

N. Kurzens kantas al ni malgaje la senpovon, kvazaŭ jam maljuna bardo :

*Hieraŭ pluvis, kaj hodiaŭ pluvus
kaj morgaŭ same, laĉe ĝibos gutoj ;
kaj same, laĉe iros la minutoj
de mia viv' seneca kaj enua.
Kaj ĉiu tag' forlavas rabe ion,
kaj ĉiu nokto portas ion for ;
kaj de l' pasinto restas nur memor'
kaj por estonto — havas mi nemion...*

Ankaŭ kelkaj poemoj de *Amalia Dubus*, de *G.E. Maura*, de *Stilman* kaj aliaj meritis esti legataj kaj admirataj ilia beleco. S.G.K.



OPINIOJ DE LEGANTOJ

El Japanujo :

« ...estas ĝuste la libera kritiko, kiu montriĝas sur la paĝoj de *Nia Gazeto*, kiu al mi abonigas ĝin, Bonvolu daŭrigi esti la organo de sentima publika opinio en Esperantujo, ĉar la verma malkuraĝo de eldenistoj timantaj perdi iujn « kontraŭopiniantajn » abonantojn degradigas nian Movadon, kiu ja devis esti granda spirita manifestiĝo interpopola, anstataŭ esti ...kio ĝi estas. »

El Francujo :

« Jen mia abonmono por du jaroj, 1936 kaj 1937, *Nia Gazeto* estas tre interesa kaj tre grava por nia movado. Daŭrigu, kaj se eble pli-grandigu ankoraŭ. »

— « Al vi mi sendas mian abonpaĝon por 1936. *Nia Gazeto* daŭre plaĉas al mi per sia enhavo kaj sia spirito, tiom pli, ke la plejmulto el aliaj periodaĵoj scias nur gurde ripeti : propagandu, propagandu ! »

El la Esperantaj Radio-Dissendoj

La nuntempa horaro de la esperantaj radio-dissendoj tiom impresas neesperantistojn, ke ili tion rimarkigas al siaj « verdaj » gekonatoj. Tiaj rimarkoj igas nin forgesi multajn klopodojn kaj nin kuraĝigas.

DECEMBRO

BRNO-PRAHA : la 4-an de decembro, pri Zamenhof kaj la Kongreso en Bulonjo ; la 18-an, popolsimpla, sincera rakonto de la kristnaska nokto, akompanata de popolaj kantoj plurvoĉaj, kelkfoje « ĉielaj », kvazaŭ niaj bravaj TRAKT-anoj estus superhome felikaj ! La 27-an de novembro okazis parolado pri la ĉefa arto kaj la influoj al kaj el ĝi.

BRUSELO FLANDRA, la 5-an de decembro, kvinminuta intervjuo inter timema demandanto kaj konvinkita esperantisto parolema.

HILVERSUM (1875 m.), la 1-an de decembro, agraba surprizo : Roland Dupuis ĝuas plej larĝan gastigon de la stacio kaj per beleta kantema voĉo priskribas sian urbon, Rouen.

LENINGRAD, la 15-an de decembro, tri gesamideanoj legis paĝojn el sovet-industria romano, kie temas pri komunistoj, ingeniero, koruptado, sekrete signitaj monbiletoj, ktp. Fine, aŭdiĝis marŝo sur laĉiganta gramofono (bela okazo por donacema kapitalisto pruvisian grandanimecon per donaco de gramofono, almenaŭ de «risorto !») ; la 19-an de decembro, propaganda parolado porsovetia, el kiu ni notas impulsdonan parolon de Stalin : La kvalito estu eksportinda ! (eĉ, sendube, por enlandanoj...) ; la 22-an de decembro, parolado pri la revolucio de 1905 ; pri stratbatalo, stratstrategio, kaj aliaj petolaĵoj.

LYON-LA-DOUA (nun LYON-P.T.T.), la 14-an de decembro fraŭlino (eble lernantino de s-ino Borel) legis la kronikon pri la blinduloj kaj ilia Asocio UAB ; ankaŭ pri la « verda » lumo de Zamenhof, kiu malfermis al niaj malfelikaj amikoj la vastan mondon.

MOTALA, la 8-an de decembro, naci-lingva parolado pri esperanto.

VARSOVIO, la 10-an de decembro, prof. Hodakowski parolis pri la pola opero, ĝia influo sur la alilandajn operojn, ĝia influo sur la polan patriotismon ; rimarkinda estas la agrabla esperanta akcento de la anoncistino.

JANUARO

HILVERSUM mallongonda aŭdiĝis (21-1-36) la belan sonorant voĉon de S-ro Heilker dum instruplena leciono al Nederlandanoj.


LENINGRAD, la 5-an, 19-an kaj 29-an de jan., daŭrigis siajn laŭlegadojn triopajn : al unutona leganto sincere respondas junaj kunludantoj ; la junulino eĉ vivigoj rebatas. De tempo al tempo aŭdiĝas muziko, interalie korŝiranta bela funebra marŝo.

LYON P.T.T. pere de s-ino Borel arte prezentis Thiers kiel urbon vizitindan laŭ ĉiuj vidpunktoj, tiom pli, ke ĝi estas « verda » urbo, uzanta diversmaniere nian lingvon kaj pruvante sian emon al esperanto per bela Zamenhof-strato. Ankaŭ ĝojis la informo pri la nuna sukceso de Lidja Zamenhof en le Havre (250 gelemantoj !), kaj pri ŝia baldaŭa dua instruado en Thiers. Fine, la informo pri granda vojaĝo farata de nia filozofa Julio Baghy, tra Francujo.

PRAHA, BRNO funebriŝ pro George la Kvina (22-1-36), kaj anstadiĝis la opereton « Blua Sango » per diskoj el ĉefa folkloro. La opereto estos ludata 11-3-36.

ROMO aŭdiĝis (25 jan.), per sunplena junvira voĉo tre afablajn salutojn al korespondintoj.

VARSOVIO : belvoĉa prof. Hodakowski prezentis, tra sia lando kaj tra la jarcentoj, la diversfakajn polajn alternejojn ; ankaŭ iliajn malfacilaĵojn flanke de eksterlandoj, kaj de militoj. Li anoncis la venontajn dissendojn por la 4-a, kaj 18-a de Februaro, la 3-a, 17-a kaj 31-a de Marto. — E. S.



STRANGA RAPORTO

Ne plu havas ŝi kataron
De la nazo. Sed kataron
Havas ŝi, ĉar laŭ inklino
Estas ŝi katamantino,
Kaj gajninte dek dukatojn
Ŝi aĉetis — dekdu katojn.

KARL VANSELOW.

Enketo pri la Televidado

Ĉar la televidado estas unu el la plej aktualaĵoj, ni dezirus, per esperanto, ricevi la plej certajn informojn pri la nuna stato de la demando en la diversaj landoj. La rezultato de tiu ĉi enketo estas publikigota en esperantaj revuoj kaj se la respondoj estas sufiĉe interesaj, oni klopodos por ke naci-lingvaj tradukoj estu reprezentaj en naciaj ĵurnaloj. Tio montras al la skeptikuloj, kion oni povas atingi per esperanto ; ĉar la precizaj kaj ne tendencaj informoj publikigitaj pri tiu ĉi demando estas ĝis nun sufiĉe malmultaj.

Do ni petas, ke vi bonvolu diri al ni kiel eble plej objektive (parolante ne pri la esperanto sed pri la efektiveco), kia estas la nuna stato de la televidado en via lando ?

Por plifaciligi al vi la taskon, ni presas ĉi-sube demandaron : sed vi povas doni viajn informojn en la formo, kiu plej plaĉas al vi. Eĉ se nenio estus farita en via lando pri televidado, ni estus al vi tre dankemaj se vi bonvolus tion scigi al ni sur simpla poŝtkarto.

DEMANDARO

1. Kiom da sendstacioj de televidado ekzistas en via lando ? En kiuj urboj ili estas ?
2. Kia estas la potenco kaj ondolongo de tiuj stacioj ?
3. Ĝis kiom da kilometroj proksimume oni povas ricevi la bildojn ?
4. Kiom da ricevaparatoj ekzistas proksimume po sendstacio ?
5. Kiu estas la ĝenerala principo de la riceviloj kaj sendaparatoj : esploro meĥanika aŭ per katodaj radioj ?
6. Kiu estas la firma kiu fabrikas la aparatojn ?
7. Kiu estas la grandeco de la ekrano sur kiu oni ricevas la bildojn ?
8. En kiom da strioj (aŭ linioj) estas malkomponataj la bildoj dissendataj ?
9. Kiaspecaj estas la sendataj bildoj ? Cu portretoj aŭ teatraĵoj ? Se teatraĵoj, kiom da personoj aperas samtempe sur la bildoj kaj ĉu la necesaj detaloj estas sufiĉe klaraj por ne lacigi la okulojn ?
10. Kiu estas la funda koloro de la bildoj ?
11. Je kiu dato komenciĝis la oficialaj dissendoj de bildoj ?
12. Kiom da televidaj dissendoj estas faritaj ĉiusemajne ?
13. Ĉu la publiko estas tre interesata de tiu novaĵo ?
14. Ĉu oni povas publikigi vian nomon aŭ ĉu vi pliŝatas ke oni vin ne nomu ?
15. Ĉu vi konas, en la diversaj landoj, kompetentajn esperantistojn kiuj povus respondi tiun ĉi demandaron ? Bonvolu : aŭ al ili sendi kopion de nia demandaro aŭ almenaŭ doni al ni iliajn adresojn.
16. Se vi havas informojn pri tio, kio ekzistas en landoj kie vi ne loĝas, ne hezitu ilin konigi.
17. Fine ĉiuj pliaj informoj, kiujn vi povus doni, estus kore akceptataj.

La respondojn, oni bonvolu sendi al : S-ro R. Mesny, 21, rue Jacob, Paris (6^e), aŭ al : S-ro P. Dejean, 289, cours Jean-Jaurès, Grenoble (Francujo).



KONGRESO DE LA TUTMONDA INSTITUCIO LA NEPERSONA VIVO

La 10-an de novembro 1935, malfermiĝis, en Parizo, la unua eŭropa Kongreso de la Tutmonda Institucio de la Nepersona Vivo, kies sidejo situas en Paris, 4, rue Lamande, 17.

Tiu Movado, kiu grupigas multajn anojn en Francujo, en la tuta Eŭropo, kaj en Centra Ameriko, celas trovi eksperimentan kaj individualan solvon al la nunaj problemoj, ĉar ĉiu ĝenerala firma pliboniĝo baziĝas sur individuala solvo. Ĝi ne sin direktas al ekstera efektiveco, sed permesas al ĉiu homo, dank'al taŭga mensa edukado, aperigi Pacon, kompreni la problemojn de la vivo kaj ilin solvi.

Kun la kunlaboro de 200 kongresanoj, reprezentantaj eŭropajn landojn, okazis tiu belega manifestacio. La nacia Deleĝito, la Deleĝito de provincoj, de Svisujo, la Deleĝito reprezentanta la esperantistojn el ĉiuj landoj, prezentis la agadon de la Movado en ĉiuj diversaj fakoj : « Agado Bona, Esperanto, Integrala Edukado, k.t.p. » La Movado Intencas apliki siajn principojn al la problemoj de la edukado de la infanoj, ebligante al ili harmonian disvolvigon, plibonigante, kiel urĝas, formadon, ne nur intelektan, sed ankaŭ mensan kaj fizikan, de la infanoj. Ni diros ankaŭ kelkajn vortojn de la raporto de la Esperanta fakoj, kiu prezentis « Frateca Esperantista Movado » n, kiu celas memorigi al ĉiu esperantisto la idealon de Zamenhof, kaj helpi ĉiun por ĝin efektiviĝi. Tio idealo estas ankaŭ tiu de la anoj de T.I.N.V. Jam P.E.M. ricevis aprobon de multaj esperantistoj el ĉiuj landoj.

En kvinta, pozitiva kaj konstruema medio fariĝadis la tuta kongreso. Dum la bankedo, organizita en la plej granda salono de la Maison des Centraux, kelkaj personoj faris paroladeton ; inter aliaj parolis s-ino Lay, reprezentanta la anojn de T.I.N.V. en Meksiko kaj Centra Ameriko. Per simplaj kaj emociaj vortoj, ŝi prezentis la belan kaj bonfaran agadon de la Meksika Grupo, la bonegon, kiun ĝi alportas al la malliberuloj, en tiu lando, ebligante al ili, kelkfoje, liberigon, dank'al nova sintenado, dank'al konsilio, kiun ili akiras.

Je la 21-a vespere, la nacia Deleĝito parolis pri « La valoro de la Movado T.I.N.V. rilate al la nunaj problemoj. » S-ro Paul Bonnet-Maury sciigis al ni pri « la nuna stato

